


Rio Esperantista

Oficiala Organo de Asocio Esperantista de Rio-de-Janeiro

N-ro 198 (2016:2)

Apr – Jun 2016



Babilado kun...
Suzana Kornicka

**Fatala pseŭdonimo
de forgesita aŭtoro**

**Esperanto en la
libro-bienalo 2017**

Rio Esperantista

Oficiala Organo de Asocio
Eperantista de Rio-de-Janeiro

N-o 198 (2016:2)

Apr - Jun 2016

75-a jarkolekto

Redaktas:

Fernando Pita kaj Allan Argolo

Aranĝas: Allan Argolo

Ĉi-numeraj kunlaborantoj:

Suzana Konicka, Márcio Santos

kaj Benedito Pereira

Kovrilo:

Rio Esperantista



Associação Esperantista do
Rio de Janeiro

Rua Teófilo Otoni, 135 / 302

telefono: 2467-4296



aerj@hotmai.com

disvastigo.aerj@gmail.com




www.aerj.org.br



facebook.com/aerj.esperanto




youtube.com/user/TVaerj



Rio Esperantista

Informativo da Associação Esperantista do Estado do Rio de Janeiro

Edição quadrimestral setembro - dezembro / 2010



Enhavo

- El la Redakcio _____ 3
- Babilado kun Suzana Kornicka _____ 4
- Pri *Progresadi* _____ 7
- Fatala pseŭdonimo de forgesita aŭtoro _____ 9
- Esperanto en la Libro-bienalo 2017 _____ 11
- Kvizo _____ 14
- Dinamisma Ŝtata Renkontiĝo _____ 15
- Renkonto en Lorena _____ 16
- La Forgesito (Poezia Angulo) _____ 18

Eventoj, eventoj kaj eventoj!

Jen en via ekrano, kara leganto, plia eldono de *Rio Esperantista*! La trimonata bulteno de Asocio Esperantista de Rio-de-Ĵanejro kiu, baldaŭ, alvenos al la eldono 200-a! por ĝi ni planas diversajn novaĵojn, siatempe diskonigotaj ĉar, vi jam scias, AERĴ estas vigla kaj aktiva parto de Esperantio.

Kaj aktivecoj tute ne mankas al ni, ĉi-eldono vere spegulas tion: en ĝi, oni rakontas al vi pri la diversaj aktivaĵoj okazintaj en Rio: en Marto ni havis, en Petropolo, la BEL-konferencojn, ĉiujara evento sponsorita de Brazila Esperanto-Ligo kaj tre bone organizita de Paulo Sergio Viana. En Aprilo, jen ni denove, kaj renove!, ĉar la jam tradicia *Instruista Trejnado* ricevis, laŭ interkonsento de nia estraro, novan formon, kiu celas ne nur la instruistoj sed ĉiuj, kiuj deziras alpaŝi pluen! En Majo ni havis nian dutagan Ŝtatan Renkontiĝon, okazinta en la kvartalo Realengo... Fine, en Junio, ni ĉeestis la Renkontiĝon de Paraíba-Valo, okazinta en Lorena. Uff! Tiom da eventoj, ĉu ne? Tiom da, ke kelkfoje oni pensas ĉu ne estus oportune ŝanĝi iun el ili al la dua semestro, kion VI pensas?!

Kion vi pensas pri pseŭdonimoj? Ĉu vi kredas ke iel tiuj kromnomoj enhavas aŭ priskribas la destinin de ĝiaj posedantoj? Nia kovrilo jam enkondukas la temon de la ĉi-numera ĉefartikolo, kiu rakontos pri



La Forgesito. Ĉu vi hazarde konas tiun esperantan aŭtoron aŭ ĉu li efektive kuŝas sur forgeso? Vi poste malkovros ke oni neniam devus forgesi lin kaj, donace, ni konigas unu el liaj poemoj ĉe nia *Poezia Angulo*.

Ĉi-eldone ni ankaŭ havas du intervjuojn: kun la pola kantistino Suzana Kornicka, kiu parolas al ni pri sia vivo kaj pri la nova kd-o lanĉita de ŝi en Pollando dum la lasta Arkones (vidu pasintan eldonon), kaj kun la prezidanto de AERĴ, samideano Márcio Santos, kiu parolas al ni pri la projektojn de nia asocio rilate al ebla partopreno en venonta Internacia Bienalo de Libro de Rio-de-Ĵanejro, ne maltrafu ĝin!

Do, mia kara, ĝuu vian *RE*-n, kiu daŭre akceptas viajn kontribuojn forme de tekstoj!

Fernando Pita

Zuzanna (Suzana) Kornicka estas pola esperantistino kiu ĉiujare etosigas la Artajn KONfrontojn en ESperanto – ARKONES per sia sentema muziko.

Okaze de la lastaj ARKONES, RE intervjuis ŝin por scii kio malantaŭas tiom bela voĉo, iom pri ŝia vivo kaj pri ŝia ĵus lanĉita albumo “Malsato de Espero”.



Rio Esperantista: *Suzana, prezentu vin al la legantoj de Rio Esperantista, por ke ni konu iom pli pri vi.*

Suzana Kornicka: Mi estas Zuzanna Kornicka kaj devenas de Pollando. Mi loĝas en Poznano. Mi estas simpla virino kiu provas realigi siajn revojn. Mi estas patrino de vere ĉarma kaj bela knabino Natalia kiu instruas min ke Vi povas fari pli multe ol Vi pensas. Ŝi donas al mi forton kiun de tempo al tempo mi bezonas.

RE: *Kiel vi konatiĝis kun Esperanto?*

SK: Mia patro estas esperantisto. Fakte mi estas duon-denaskulino kaj ekde mi memoras miaj gepatroj prenis min kaj mian fratinon al diversaj E-aranĝoj, precipe Arkones kiu okazas en Poznano, jaro post jaro, septembre. Tio fariĝis ke mi komencis paroli esperante kaj kiam mi estis plenkreskulo mi decidis fari studojn en Bydgoszcz, ĉe Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo. Tie mi fariĝis lektoro de Esperanto pri Cseh Metodo. Sed neniam mi instruis ĉar mi ne sentas min kiel instruistino. Mi preferis iri al muziko :-)

RE: *Vi kaj via gitaro aspektas ne-disigeblaj. Diru al ni kiel la muziko eniris vian vivon, kaj kiam vi malkovris vian talenton por kantado.*

SK: Ekde kiam mi memoras mi ŝatis kanti. Kaj kiam mi estis malgranda knabino mi realigis kantadon en preĝeja ensemblo. Kaj poste mi komencis pensi: “Kial ne kanti dum Arko-

Suzana kaj ŝia filino Natalia



nes, kiu estas por mi kiel dua hejmo?” Kaj poste mi decidis kanti dum tiu aranĝo kaj mi faras tion ĝis hodiaŭ. Kiam mi kantis en preĝeja ensemblo mi vidis homojn kiuj ludis gitaron kaj post iom da tempo mi realigis mian unuan revon kaj lernis gitarludon sole. Neniu instruis min.

RE: *Vi havas tre belan kaj varman voĉon. Kiajn specialajn zorgojn vi havas por protekti ĝin?*

SK: Dankon, Fernando, por vere varmajn vortojn. Sed ĉu ĝi fakte estas tiel varma kaj bela? Miaj amikoj ĉiam diras ke estas tro laŭta :-). Mi ne havas specialajn zorgojn. Mi nun provas multe trinki. Nenio ajn.

RE: *Ankoraŭ pri muziko, ĉu estas artistoj (esperantaj aŭ ne) kiuj inspiris vin kaj kiujn vi havas kiel modeloj? Se jes, kiujn nomojn vi povas menci?*

SK: Jes, ekzistas kelkaj artistoj kiuj inspiris min. Ĉiu artisto kiu faras muzikon, bonan muzikon estas por mi inspiro. Sed por mi pli gravaj estis paroladoj. Mi multe parolis antaŭe kun Jean-Marc Leclercq – jOmO. Kaj multe mi parolis kun Floréal Martorell – Flo. Ili ambaŭ montris al mi vojon kiun mi devas iri. Ili montris al mi kion mi povus fari pli bone, kaj

ekzemple pro tio mi staras sur sceno. Antaŭe mi sidis :-). “Kiam vi staras vi havas pli bonan komunikadon kun publiko” – tion diris al mi ili ambaŭ.



Kovrilo de la albumo
“Malsato de Espero”

RE: *Vi ĵus lanĉis vian debutan diskon “Malsato de Espero”, bonvolu ion diri al ni pri ĝi, dekomence klarigante por ni la titolon.*

SK: Jes, mi lanĉis mian propran diskon. Tio estis la plej granda revo kiun mi povus realigi kun helpo de mia amiko Zbyszek Galor. Mi pensas ke sen lia helpo, sen lia forto kaj kredo mi ne realigus ĝin. Fakte Zbyszek kredis je mi pli multe ol mi mem kaj pro tio vere grandegan gankon al li.

Titolo “Malsato de Espero” estis unu el kelkaj titoloj kiujn proponis al mi

Zbyszek. Ni ambaŭ elektis la samon. :-) Sed nun mi pensas ke ĝi estas vere bonega, se ni parolas pri realigo de Siajn revojn.

Kiam vi volas realigi ion pri kion vi revas, vere forte revas, ne ĉiam vi havas forton kaj okazon realigi. Sed kiam vi realigas viajn malgrandajn revojn, poste vi revas pli. Kaj ĉiam en via koro estos *Malsato de Espero*. Vi ĉiam esperas ke viaj revoj realiĝos. En Pollando oni diras ke “Apetito kreskas dum manĝado”. Sed mi pensas ke la titolo de mia disko estas pli bona frazo – ĉu ne?

Kantojn kiujn vi povas aŭskulti estas diversaj. Kaj esperantaj kaj fremdlandaj. Sed ĉiuj kantoj estis kaj estas en mia vivo. Do pro tio mi elektis tiujn kantojn, ne aliajn.

RE: *Por fini, diru al niaj legantoj kion ajn vi deziru.*

SK: Mi deziras al ĉiuj aŭskultantoj kaj legantoj:

Ĉiam provu realigi viajn revojn. Ŝtupo po ŝtupo vi povas fari ĉion. Ne finiĝu revj, ĉar kiam vi revas vi havas esperon ke vi povas fari ĉion.

Ni vizitos vin!



Redakcio

Nia Asocio ĉiumonate okazigas estrarajn kunvenojn, kie oni ne nur diskutadas kaj decidas pri la ĉiutagaĵoj de nia kara AERĴ, sed ankaŭ strategiojn por trafe atingi niajn plej karajn celojn: instrui kaj disvastigi Esperanton en nia ŝtato. Kompreneble, en tiuj kunvenoj ni decidas la ĝeneralan panoramon de ĉiuj aktivaĵoj normale okazantaj dum la jaro, kaj tiam estas la momento por ke ni (re)pensu la vojojn sekvitajn, cele al pliboniĝo.

En unu el tiuj diskutoj oni parolis pri nia ĉiujara *Instruista Trejnado*, evento normale aranĝita de AERĴ, ene de kiu oni celas prezenti novajn instruteknikojn al tiuj kiuj sindediĉas al instruado de Esperanto. Tamen, komparinte la ĉeestantaro de la lastaj jaroj, ni rapide rimarkis, ke ĝi ne multe variis. Do prezentiĝis demando: kial tio okazas? Cerbumante pri tio, nia valora amiko José Carlos Araújo alvenis al la plej ebla konkludo, kaj tiu estis tre simpla: se la evento estas porinstruista, kompreneble nur instruistoj ĉeestos. Evidentaĵo? Jes, sed kelkfoje rimarki tion, kio estas memevidenta, ne estas facila tasko, ĉar niaj okuloj tiel al kutimiĝis al pejzaĝo, ke oni ne plu rimarkas ion ajn en ĝi, ĉu ne?

La respondo al la unua demando tuj kondukis al duan: Kiel ŝanĝi tiun bildon? Kiel? Kion novan oni povus prezenti por instigi niajn movadanojn ĉeesti eventon? Tiam “la lumo fariĝis” kaj oni proponis, ke tiujn eventojn ne plu celu nur instruistojn, sed ankaŭ tiujn kiuj, komencinte sian lernadon, deziras iom progresi kaj plifunde koni la lingvon. Tiel naskiĝis *Progresadi*, nomo proponita de nia fasonisto Allan Argolo, kaj tuj akceptita de ĉiuj.

Do, ĉijare, kiel provo, oni realigis, je la 17-a de Aprilo, anstataŭ la kutima *Instruista Trejnado*, la unuan eventon *Progresadi – Esperanto post la baza kurso*.

Al la renkonto, ĉeestita de pluraj homoj, estis ofertitaj, krom la kutima interŝanĝo de spertoj



Afiŝo de la evento
Fasonis: Bruno Longo

inter instruistoj, prelegoj pri esperanto mem: la unua el ili estis “Strangaj punktoj de la esperanta gramatiko por brazilanoj”, kiam Prof-ro Fernando Pita prezentis kelkajn punktojn kie la brazila lernanto kutime trovas malfacilaĵojn lerni kaj, postulas de ni iom pli da atento ol kutime. Poste, la junulo Leandro Silvestre, reprezentanto de Karejo, prezentis aktivaĵon titolitan *La plej valora trezoro*. Tiam, partoprenantoj kunkantis kaj analizis esperantan version de la infankanto *Zime Zum* kaj sekve spektis filmeton kiu titoligis la aktivaĵon.

Revene de l’ tagmanĝo, denove prelegis Prof-ro Pita, ĉi-foje pri sia ĵus eldonita “Bazan Kurson de

Esperanto”. Ĉi-tiu prelego celis prezenti al instruantoj de Esperanto manierojn por utiligado de tiu nova lernmaterialo, eldonita okaze de lasta Internacia Libro-Bienalo de Rio. Fine, alia karejano, Allan Argolo, prezentis la “Superbazaron”, aktivaĵo kies celo estas paroligi lernantojn kaj konigi al ili vortojn por ĉiutagaĵoj.

Laŭ taksado de la ĉeestantoj, *Progresadi* estis sukcesa evento, kiu atingis ĉiujn siajn dekomencajn celojn kaj, eble fariĝos jara nova evento realigota de AERJ, kies aktivaĵoj celos igi homojn ade antaŭeniri siajn konojn pri nia kara lingvo, ĉar ne sufiĉas ke homoj ekkomencu lerni Esperanton, sed ke ili entute lernu ĝin, ĉu ne?

Oportunaj varoj por via bretaro atendas vin en nia libroservo!



Fernando Pita

Kvankam mi ne kutimas esti mistikema homo, kelkfoje mi staras antaŭ situacioj kiuj ne povas esti alimaniere klarigitaj ol per magio. Vivo jam montris al mi, ke kromnomoj povas ja enteni la destinon de uloj. Ekzemple: ĉu la serioza sinjorina nomo Dolores Costa Bastos havus la saman impakton ol tiu de *Dercy Gonçalves*? Ĉu la malgranda sinjoro Sebastião Rodrigues Prata estus tiel bonhumoriga se li ne uzus la pseŭdonimon *Grande Otelo*? Kaj ĉu la impona nomo de “Don” Oscar Lorenzo Jacinto de la Inmaculada Concepción Teresa Díaz estus tiel furora kaj humora kiel *Oscarito*? Mi povus eĉ aldoni pliaj ekzemplojn sed mi kredas ke tiuj jam sufiĉas por enkonduki nian temon kaj ties rilato kun la esperanta kulturo, ĉar en la eta mondo de la esperantaj kromnomoj neniuj estis pli profeta ol tiu de *La Forgesito*. Sed por tion klarigi mi devas rakonti historieton.

Amikoj de Esperanto-klubo devis forlasi ties antikvan sidejon kaj translokiĝi al nova, kaj multe pli malgranda, loko. Tamen, pro tio ili devis alfronti tute novan problemon: kion fari kun sia granda kaj multvoluma biblioteko? Ĉar la nova sidejo ne povus enteni tiom granda kvanto da libroj, ili decidis donaci la librojn al AERĴ, kaj al mi estis petite kunporti la librojn al mia domo kaj poste disdoni ilin inter aliaj esperanto-grupoj, kiuj, domaĝe, kutime eĉ ne disponas pri librobreto.

Dum mi selektis kiajn librojn irus al kiuj kluboj, mi rimarkis vere malgrandan ekzempleron de libro titolita “*Ama Stelaro*”, kies aŭtoro uzis la pseŭdonimon *La Forgesito*. Ĝi ja

estis malgranda libreto, eldonita en Germanio en la jaro 1922, kiu, mi konfesu, ne vekus en mi pli da atenton se, trafoliumante ĝin, mi ne estus tute surprizita pro tio ke, en la tekstoj estis tradukoj de Coelho Neto,

Olavo Bilac kaj aliaj brazilaj aŭtoroj de la parnasisma fazo! Do la germana libro enhavis tradukojn de brazilaj aŭtoroj kiuj, hodiaŭ, estas jam forgesitaj. Strange, ĉu ne?



Karikaturo de Dercy Gonçalves (1907 - 2001), fama brazila aktorino, humuristino kaj kantistino.



Grande Otelo (maldekstre, 1915 - 1993) kaj Oscarito (dekstre, 1906 - 1970) en la brazila humura filmo *Matar ou correr* (Mortigi aŭ kuri), 1954.

Ĉar esperanta literaturo estas unu el miaj plej grandaj interesoj en nia verda mondo, mi tuj provis ion pli scii pri tiu libro, kaj precipe kiu estis tiu homo kies pseŭdonimo ja estis atentveka. Danke al helpo de mia kora amiko (ne koramiko!) James Piton, mi malkovris, kaj tio estas ja gapiga!, ke la ulo estis brazilano, fondinto de la unua esperanto-klubo de Rio-de-Janeiro, la Brazila Klubo Esperanto (BKE), embriono de estonta Brazila Esperanto-Ligo, kaj de diversaj aliaj esperanto-grupoj en diversaj urboj de la lando! *La Forgesito* estis ne nur unu el la unuaj esperantistoj de Brazilo, sed unu el tiuj veraj pioniroj kiu kunportis nian verdan torĉon kie ajn ĝi iris! Alia kuriozaĵo estas, ke *La Forgesito* estis maramea kuracisto, specialiĝinta pri oftalmologio, same kiel Zamenhof.

Tamen restas demando: kial tiu libro, kaj sia aŭtoro, estis ja forgesitaj de tiamaj kaj postaj esperantistoj? La nura supozebla respondo kuŝas en du datoj: la libro estis eldonita en internlanda urbo de Germanio dum la sama jaro de morto de ĝia aŭtoro. Tial, konsiderante ke la libro devis esti persipe sendita brazilan, eble ĝi atingis nian landon ĵus antaŭ aŭ tuj post forpaso de la aŭtoro. Ne estis do, kiu antaŭenpuŝigu la disvastigadon de tiu interesa libreto, kaj plenumiĝis tiel la profetaĵo kaŝita en lia pseŭdonimo...

Sed plej grava afero estas ankoraŭ dirota: dum ĉiuj miaj jaroj en Esperantujo, mi ĉiam aŭdis (kaj eĉ instruis!) ke, la unua esperanto-libro skribita kaj eldonita en Brazilo estis *Veterano?*, de Ismael Gomes Braga, publikita en 1937. Nun mi konstatas ke tio estis nur duonvera, ĉar *Veterano?* ja estas la unua libro eldonita en Esperanto en Brazilo, sed oni ne plu povas diri, ke ĝi estas la unua libro skribita en Brazilo, nek de bra-


Ismael Gomes Braga,
Veterano?, KKE, 1937.



zilano, ĉar libro de *La Forgesito* antaŭiris *Veterano*-n de 15 jaroj! (Tio neniel ŝtelas de Iŝmael liajn glorojn pro sia dumviva batalado por nia kaŭzo, sed nepras rekoni, kaj fari justecon al nia pionira, kaj profeta, *forgesito*.)

Do la rezulto estas ke ni, esperantistoj, ja devas pli profunde koni ne nur nian lingvon, sed ankaŭ nian historion, nian literaturon kaj nian kulturon, por ke ne plu estu *forgesitoj*, kiel la aŭtoro de *Ama Stelaro*, kies nomo, finfine mi diras, estis Nuno Baena.

Kovrilo de
Ama Stelaro



Esperanto en la Libro-bienalo 2017

Movado

En antaŭa eldono, ni parolis pri nia partopreno en la Internacia Libro-Bienalo de Rio-de-Ĵaneiro, sed oni ankoraŭ ne havis, enmane, la precizajn nombrojn, kiuj povu ĵustigi, laŭ ekonomia vidpunkto, nian partoprenon en la evento. Tiel en nia eldono de RE, ni intervjuas la prezidanton de AERĴ, Márcio Santos, kiu klarigas al ni kelkajn punktoj pri tiu flanko de nia ĉeesto en la Bienalo.

La Libro-Bienalo de Rio-de-Ĵaneiro ĝenerale okazas inter la monatoj Aŭgusto kaj Septembro, altirante gigantan publikon: estas ekskursoj el diversaj urboj, alportantaj lernantoj

kaj studentoj, krom personoj el ĉiuj aĝ- kaj sociaj grupoj kiuj interesiĝas pri literaturo, kulturo kaj

arto. En 2015, la evento havis, dum dek unu

tagoj, rekordan publikon de pli ol sescent mil personoj.

Nia budo ĉe Bienalo 2015 montriĝis bonega spaco por disvastigo kaj propagando – rekta kaj nerekta – de nia afero, prezentante la Internacian Lingvon al ĉeestantaro jam alkuti-miĝinta al kulturaj fenomenoj.

RE: Bone, ĝi estas grandega evento, sed ĉu ĝi estis bona por Esperanto kaj por AERĴ?



MS: Jes, kompreneble! Kontrolu la nombrojn kaj vi tuj konstatos la furo-ran disvastigon de nia lingvo ĉe Bienalo: estis disdonitaj pli ol 8.000 faldfolioj, pli ol 700 personoj vizitis la budon kaj lasis siajn retroŝtojn kaj telefonnumerojn kaj manifestis sian deziron pli bone koni la lingvon aŭ ĉeesti kurson. Centoj da homoj, eble miloj, unuafoje aŭdis pozitive pri Esperanto, pere de diversaj libroj, afiŝoj kaj fotoj kiuj montris lingvon vivantan, modernan kaj kongruan kun la nepraĵoj de la 21-a jarcento.



La esperanta budo kaj kelkaj el la disvenditaj titoloj

RE: Sed ĉu tio tradukiĝis en mono, tio estas, ĉu nia partopreno estis profita?

MS: Jes, jes! Kvankam tia ne estis nia unua celo, ni eĉ havis relativan profiton! Estis venditaj pli ol 200 libroj, aĉetitaj ne nur de esperantistoj, sed, kaj precipe, de interesatoj koni la

lingvon, kio movigis renton je pli ol R\$ 8.000,00, pro disvendado de libroj el AERĴ, EASP, Societo Lorenz kaj KKE. Oni disvastigis la esperantan kulturon kaj samtempe finance helpis tiujn instituciojn, kaj ĝuste pro tio ni, en AERĴ, decidis partopreni en la Bienalo 2017, kiu okazos de la 31-a de Aŭgusto ĝis la 10-a de Septembro.

RE: Ĉu?! Ĉu vi vere celas tion fari?

MS: Jes, kaj, por la evento de 2017, oni intencas almenaŭ ripeti la sukceson de 2015.

RE: Ĉu vere? Tamen, ege pozitiva punkto ĉe Bienalo 2015 estis la eldonado de libroj, ĉu tio denove okazos? Ĉu vi ion planas tiurilate?

MS: Jes, ni planas prepari almenaŭ 4 novajn titolojn: la unua el ili estas reeldono de *Ama Stelaro*, la unua esperanta libro verkita de brazilano; la dua estas esperanta traduko de *Bom-Crioulo*, klasika romano de la brazila literaturo; pri la tria ni diskutas, inter ni kaj kun la eldonejoj, ĉu ni lanĉos brazilan, dulingvan, eldonon de *La Eta Princo*, la plej disvendata beletra libro de 2015. Pri la kvara oni ankoraŭ planas



Bom-crioulo, romance de Adolfo Caminha de 1985

ĉu ĝi estos prilingva aŭ pli literatura verko...

RE: Bone, mi vidas ke vi havas multajn planojn por la estonta Bienalo... tamen, kiel vi efektivigos ilin? Ĉu vi jam disponas la monon por tion fari?

MS: Dekomence, ni enkalkulas la saman investon faritan en 2015 (R\$ 20.000,00) danke al strategioj kreitaj por ne pligrandigi niajn financajn bezonojn. Aliflanke, oni strukturiĝas por ĉiufoje malpli dependi de movada kunlaboro; tiel, se por Bienalo 2015 oni serĉis sponsorojn kiuj kontribuu kun nura kvoto de R\$ 200,00; nun, por 2017, oni petas al sponsoroj kontribuojn de nur R\$ 100,00. Eble tio povas aspekti multe, tamen, pere de tiu valuto vi povos kunlabori por ke aliaj centoj da junuloj, instruistoj, studentoj, universitatanoj, tutaj familioj ekkonu la Internacian Lingvon.

RE: Kaj ĉu vi jam sukcesis tiujn sponsorojn?

MS: Ne ĉiuj, malfeliĉe. Oni anoraŭ bezonas samideanojn kiuj ĉirkaŭbraku tiun aferon, kaj helpu nin en la kostoj, por ke ni disponu la tutan necesan kapitalon por nia partopreno en la evento. Oni kompreneble akceptas

ajn-valutajn kunlaborojn. Ni estas jam en kampanjo!

“vi povos kunlabori por ke aliaj centoj da junuloj, instruistoj, studentoj, universitatanoj, tutaj familioj ekkonu la Internacian Lingvon.”

RE: Márcio, viaj finaj vortoj:

MS: Mi nur volas denove danki al tiuj kiuj iamaniere kunlaboris kun la efektivigo de nia partopreno en Bienalo 2015. Kaj peti ke, se vi konsideras ke ni realigis bonan laboron por Esperanto, pensu denove kunlabori kun ni, ĉu pere de persona laboro, deĵorante en nia budo, aŭ pere de sponsorado, finance kontribuante por nia kampanjo! Kontribuoj povas esti faritaj ĉe Banco do Brasil, agentejo: 3518-1 Ŝparkonto: 420.822-6 variaĉio 51.



En la numero 194 de Rio Esperantista, oni demandis al la legantaro ĉu ili kapablus rekoni, per foto, tre ordinaran lokon de Rio. Tamen, pro diversaj kialoj, la respondo al tiu kvizo ne estis publikigita en la postaj eldonoj de RE. Nu, tiu belega ĉe-mara preĝejo tiam montrita estas tiu al “Sankta Luzia”, je la hodiaŭa vojkruciĝo inter tiu samnoma strato kaj la Avenuo “1-a de Marto”. Kiel oni vidas en la foto, tiam, en la 19-a jarcento, antaŭ tiom da talusoj, tiu malgranda sed simpatia kirko estis atingebla nur tra la maro. Kiel oni modifis nian urbon, ĉu ne?



Ĉi-numere jen nova kvizo, tre facila por tiuj kiuj kutime vizitas niajn kartojn. Unua respondo atinganta la retpoŝtaron de RE gajnos ekzempleron de foto en la 20-aj jaroj, ĉu vi povas respondi kiu estas tiu loko?



Ĉiuj ni scias, ke Majo estas la “Monato de la fianĉinoj”, ĉu ne? Jes! Sed ankaŭ de nia Ŝtata Renkontiĝo de Esperanto! Nia ĉiujara renkontiĝo, nun en sia 27-a eldono, okazis en *Colégio Francisco de Assis*, en Realengo, ĉarma kvartalo de la Okcidenta Regiono de Rio-de-Janeiro kiu, dum la 14-a kaj la 15-a de tiu monato, malfermis al ni siajn pordojn kaj denove, kiel ĉiam, tre gasteme afable cedis al AERĴ tre bonan lokon por la evento.

Ankaŭ pripensante kiel iom alporti novajn diskutojn kaj interŝanĝon de ideoj al niaj rondoj (vidu la tekston pri *Progresadi*, en tiu ĉi sama eldono), ĉi-jare ni decidis ion novan proponi al partoprenantoj: la temo de la renkontiĝo estu neesperanta, tamen tuŝanta nian lingvon. Tiel, laŭ ideo prezentita de nia amiko Álvaro Motta, oni elektis la temon “*Esperanto e Sustentabilidade*”, kaj, anstataŭ ĝeneraligi ĝin, ni ja faris legadon kaj debato pri la punktoj proponataj de Unuiĝintaj Nacioj (UN) por la planedo. (Tiel eblis al la ĉeestantoj havi pli precizajn informojn pri la aktuala stato de tiu monda problemo kaj kiel Esperanto povas helpi en solvado de tiu nepra demando).

Ĝuste pro tio, anstataŭ prezenti diversajn prelegojn, ni dividis laŭteme la du tagojn de la evento: en la malferma tago ĉio rondiris laŭ la ĉeftemo. La samideanino Alcione Koritzky malfermis la eventon parolante pri la Celoj por Daŭripova Evoluigo, proponataj de UN em 2015 por alfronti tiun mondan problemon, kaj pensigis la ĉeestantaron pri kiamaniere Esperanto povas kontribui en ties solvo.



Afiŝo de la evento
Fasonis: Bruno Longo

Poste, nia kara Allan Argolo daŭris la debaton prelegante specife pri io, sen kio neniu povas vivi: akvo.

Dum tiuj programeroj okazis, rimarkendas ke nia instruisto Benedito Pereira enkondukis kelkajn vizitantojn en la unuajn kontaktojn kun nia lingvo, oferante al ili fulman bazan kurson.

Posttagmeze, jen nova prelego de Fernando Maia, ĉifoje pri diversaj neesperantaj organizoj kiuj malfermas sin al Esperanto kaj ĝiaj specifaj

traĵtoj kaj sintenoj rilate al nia lingvo. Fine, nia kara prezidanto Márcio Santos prelegis pri la konkretaj rezultoj de nia partopreno ĉe Internacia Libro-Bienalo en 2015, kaj same komencis novan kampanjon por nova partopreno en 2017 (vidu, en tiu ĉi eldono, ĉi-tema intervjuo kun li). Fermante la unuan tagon, ni okazigis la jaran Ĝeneralan Asembleon de AERĴ.

La dua tago de nia ŝtata renkontiĝo okazis dimanĉe matene, kaj estis dediĉita al pure esperantaj temoj, nia veterano Paulo Carvalho prelegis pri la vivo de pastro Andreo Ĉe, la homo kiu kreis tute novan metodon por

lingva instruado, cele orientita al Esperanto. Sekve, alia Paŭlo, ĉi-foje Sergio Viana, prezentis sian fame konatan *Guton da Gramatiko*, por ke ĉiu ĉeestanto iom lernu el tiu nia vera movadano.

Plia novaĵo de ĉi-jara renkontiĝo estis ke, fine de ĉiu prelego, okazis kaj la demandoj de la ĉeestantoj kaj plensukcesaj dekminutaj artaj prezentadoj de la diversaj artistoj kiujn havas la esperanta mondo, kio donis al nia evento novan dinamismon kaj ĝojigis la ĉeestajn samideanojn.

Raporto *Renkonto en Lorena*

Benedito Pereira

En ĉarma urbo Lorena, en la ŝtato San-Paŭlo, kaj ene de agrabla kaj amikeca etoso, efektiviĝis la 5-an de Junio la Renkonto de Paraíba Valo. Jam en la antaŭa tago, kelkaj partoprenontoj, respondante al invito de Paŭlo Sergio Viana, ĝue kunvenis por manĝi bongustegan picon en restoracio proksima al loko kie okazus la renkonto.

Ĉe la akceptejo tre bongusta lunĉo atendis, por vigligi nian korpon kaj, apud ĝi, la librovendejo same atendis por pliklerigi niajn spiritojn. En la akceptejo mem ni rimarkis la daŭreman bonan etoson de la antaŭa tago.

Post individua prezentado de la partoprenantoj, nia reĝisoro Paŭlo Sergio Viana transdonis vorton al

S-ro Túlio Flôres, kiu rakontis etan historion pri Esperanto. Tuj poste, D-ro João Santos prelegis pri siaj travivaĵojn dum instruado de nia lingvo kaj faris kelkajn komparojn inter nacia lingvo kaj Esperanto. Pri tio ankaŭ paroladis pluraj esperantistoj, kiuj laboris intern- kaj eksterlande favore al Esperanto. Fine, pluraj demandoj estis responditaj de la preleginto, nome: “*Kiom da esperantistoj estas en la mondo?*”; “*Kiu estas la plej grava iniciato de UEA: ĉu instruado, disvastigado aŭ praktikado?*”, kaj aliaj.

Ĉirkaŭ kvardek kvin homoj partoprenis varman kaj fertilan diskutadon provokitan de Márcio Santos, prezidanto de AERJ, kiu okazigis profundan pripensadon inter la partoprenantoj, kiuj prezentis plurajn ideojn por hejti la movadon en la Paraíba Valo.

Post svarmego da ideoj Marcio disdonigis gravan leteron de AERJ koncerne al la venonta Libro-Bienalo, en 2017. Givanildo Costa, prezidanto de KKE, insistis pri la neceso daŭrigi la laboron kaj la

profunda kompromiso de la esperantistoj kun tiu kaŭzo.

Inter la prelegoj, nia klera reĝisoro provokis la partoprenantojn per tiu, kiu estas nomata “Guto da Gramatiko”: etaj kvizoj pri scio de gramatiko de Esperanto. La lastan programeron estigis la juna esperantisto Alex Prado, kiu ekspoziciis du filmojn; inter ili, reklamo pri NASK. Tiu instigis la partoprenantoj pripensi eblon starigi, en UNISAL mem, periodan kurson simila al tiu, kiu okazas en Norda Ameriko.



En la lastaj momentoj, la ĉeestantoj forte promesis partopreni en la dua parto de la Renkonto de la Paraíba Valo, tiufoje en la rio-de-janejra flanko de la landlimo okazigonta en urbo Paraíba do Sul la 6-an de Novembro.

Neĝa statuo

(Al Donjo)

Revante mi konstruis statuon

Sen similo en la tuta mondo,

Blanka kiel ciruso,

Brila kiel stelo.

Mi al ĝi belaĵojn ĉiujn donis.

Tiel bela estis ĝi, ke ravis

Vere min, la kreinton.

Ĝiaj formoj belaj.

Pasie mi ĵetis min rapide

Por ĝin preni arde kaj soife,

Por tuj ĝin ekanimi

Per avidaj lipoj.

Ho ve! La marmoro estis songo;

Nur revaĵo la malglata formo,

El neĝaĵo farita

De ludemaj buboj.

El la libro: *La Forgesito*, Ama Stelaro,

Oskar Ziegler & Ko., 1922.

Celoj por Daŭripova Evoluigo dum la periodo 2015-2030

1 Forigi malriĉon ĉie, en ĉiuj ĝiaj formoj.



9 Konstrui elteneman infrastrukturon, akceli inkluzivan kaj daŭripovan industriigon kaj kultivi inventemon.



2 Forigi malsaton, atingi manĝo-sekurecon kaj pli bonan nutraron, kaj antaŭenigi daŭripovan agrikulturon.



10 Redukti malegalecon ene de landoj kaj inter landoj.



3 Garantii sanajn vivojn kaj kreskigi bonfarton por ĉiuj homoj en ĉiuj aĝoj.



11 Igi urbojn kaj homajn loĝejarojn inkluzivaj, sekuraj, eltenemaj kaj daŭripovaj.



4 Garantii inkluzivan kaj egalecan, bonkvalitan edukadon kaj plivastigi por ĉiuj la ŝancojn por tutviva lernado.



12 Garantii daŭripovajn formojn de konsumado kaj produktado.



5 Atingi egalecon inter la seksoj kaj plivastigi la decidopovon de ĉiuj virinoj kaj junulinoj.



13 Urĝe agi por kontraŭbatali klimatsanĝigon kaj ĝiajn efikojn (konforme al la Kadra Konvencio de Unuiĝintaj Nacioj pri Klimatsanĝigo).



6 Garantii al ĉiuj homoj haveblon kaj daŭripovan mastromadon de akvo kaj sanitaraj sistemoj.



14 Konservi kaj daŭripove utiligi la oceanojn, marojn kaj marajn resursojn cele al daŭripova evoluigo.



7 Garantii al ĉiuj homoj alireblon al pagebla, fidinda, daŭripova kaj moderna energio.



15 Protekti, restarigi kaj disvastigi daŭripovan uzadon de teraj ekosistemoj, daŭripove mastromi arbarojn, kontraŭbatali dezertiĝon, haltigi kaj inversigi la degeneradon de grundoj kaj haltigi la perdiĝon de biodiverseco.



8 Antaŭenigi daŭran, inkluzivan kaj daŭripovan ekonomian kreskon, plenan kaj produktivan dungitecon kaj bonkondiĉan laboron por ĉiuj homoj.



16 Antaŭenigi la konstruadon de pacaj kaj inkluzivaj socioj por daŭripova evoluigo, garantii aliron al justico por ĉiuj homoj, kaj starigi efikajn, respondecajn kaj inkluzivajn instituciojn sur ĉiuj niveloj.



17 Plifortigi la realigajn kapablojn kaj revigligi la tutmondan partnerecon por daŭripova evoluigo.



La celaro de UN por daŭripova evoluigo en esperanto.

Fonto: Universala Esperanto-Asocio, *Revuo Esperanto* 1296 (11), Novembro 2015.



ESPERANTO- TAGO

26.07.2016

Internacia Esperanto-Kongreso, Bandung, Indonezio



*Justa
komunikado*



Pri lingvoj: www.lingvo.info

Pri interreta komunikado: www.esperanto.net | www.uea.org

Ellernu
Esperanton:
www.lernu.net



LA LINGVO INTERNACIA